Kvaronjara
# Bulteno
de la

Quarterly
# Bulletin
of the

## Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
## American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) (Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numeroj 184 ISSN: 0002-7499 aprilo-majo 2010

## Enhavo

AATE Matters
- Jarkunsido la 29an de majo ... 1
- Mesaĝo de nia prezidanto ... 1

Teaching Suggestions ... 2
ILEI Matters ... 2
Esperanto-Instruado en Usono ... 2
Recommended Reading ... 3
Esperanto-Instruado Aliland ... 4
From and About Our Members ... 4
Kunlaboro ... 5
Kalendaro ... 5
Pri Ekzamenoj ... 6
Anoncoj ... 6
Jar-raportoj de Niaj Estraranoj ... 6
- De nia Prezidanto, Ron Glossop ... 6
- De nia Vic-prezidanto, D Gary Grady ... 7
- De nia Kasisto, Mary Napolitan ... 7
- De la Redaktoro de nia Bulteno, Doroteo Holland ... 7
- De nia Eduka Sekretario, Sherry Wells ... 7
- De nia Koresponda Sekretario, Sally Lawton ... 8
- Pri la Perkoresponda Esperanto-Kursaro ... 8
- Pri la Usona Ekzamena Servo ... 8

Balotilo ... 9
Course Report Form ... 10
AATE Membership Form ... 12

*Redaktoro*
Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA
<dorothyjeanh@gmail.com>

*Vic-Prezidando / Bultena Formatisto / Retejestro*
D Gary Grady <dgarygrady@verizon.net>

*Prezidanto*
Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

*Eduka Sekretario*
Sherry Wells <esperantosherry@tm.net>

*Koresponda Sekretario*
Sally Lawton <slaw-o@crocker.com>

*Kasisto*
Mary Napolitan <mjpn@comcast.net>

http://aaie.us

AATE Matters

## Jarkunsido la 29an de majo

Nia jarkunsido okazos en la kadro de la kongreso de Esperanto-USA en Bethesda, MD je la 1-a horo ptm sabaton, la 29-an de majo, ĉe la hotelo Hyatt Regency Bethesda, One Bethesda Metro Center, 7400 Wisconsin Ave., Bethesda, Maryland 20814.

## Mesaĝo de nia prezidanto, Ronald Glossop

Nia organizo, AAIE, estas membro de ILEI [Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Noto de la redaktoro]. ILEI ĉi jaron anoncis novajn politikojn por ĉiuj landaj organizoj.

(1) La Prezidanto de la landa sekcio devos esti la Sekciestro kiu raportas al ILEI. Dum multaj jaroj Doroteo Holland estis la Sekciestro por AAIE kaj tial raportis al ILEI. Dum kvar jaroj Ronald Glossop estis la Prezidanto de AAIE. Nun Doroteo rezignis kiel Sekciestro kaj Ronald estas ambaŭ Prezidanto kaj Sekciestro de AAIE.

(2) Ĉiuj postenuloj de ILEI havos oficperiodon de tri jaroj ekde la jaro 2009. ILEI rekomendas ke la postenuloj de la landaj sekcioj ankaŭ havas oficperiodon de tri jaroj ekde la jaro 2009.

La unuan politikon de ILEI ni en AAIE jam sekvas. Tute ne estas problemo.

Sed la dua rekomendita politiko de ILEI postulas ŝanĝon en la aranĝo por la AAIE-elektoj. Dujara oficperiodo de AAIE ne akordas kun la rekomendita politiko de ILEI.

Efektive estas alia problemo interne de AAIE. Dum la pasintaj du jaroj la Prezidanto ne povis trovi membrojn kiuj estas pretaj servi kiel membroj de la Kandidatiga Komitato. Tial li sole devis fari tiun taskon. Ŝajnas ke estus pli facila afero starigi Kandidatigan Komitaton je ĉiuj tria jaro. Tiu Kandidatiga Komitato devos trovi kvin kandidatojn samtempe, sed tio ne estus pli malfacile ol trovi du aŭ tri kandidatoj ĉiun jaron.

Por akordi kun la aranĝo de ILEI, AAIE devus ŝanĝi sian statuton dum la venonta jaro. Jen la vortumado kiun mi rekomendas.

*V. POSTENULOJ estas prezidanto, vicprezidanto, koresponda sekretario, eduka sekretario, kasisto, kaj redaktoro. Ĉiu (krom la redaktoro) estas elektita inter la membroj dum jara kunveno por trijara deĵor-periodo kiu komenciĝas je la fino de la jarkunveno je la jaro 2012 kaj je ĉiuj tri jaroj post tio.*

ANGLE:

*V. OFFICERS are president, vice-president, corresponding secretary, education secretary, treasurer, and editor. Each one (except the editor) is elected from among the members during an annual meeting for a three-year term, which*

*begins at the end of the annual meeting in the year 2012 and every three years after that.*

En la pasinta jaro (2009), AAIE elektis Ron Glossop esti Prezidanto, Gary Grady esti Vic-Prezidanto, kaj Sally Lawton esti Koresponda Sekretario por dujaraj ofic-periodoj. En la nuntempa jaro (2010), AAIE devos elekti Kasiston kaj Edukan Sekretarion por dujaraj deĵor-periodoj. Se AAIE adoptus la sugestitajn ŝanĝon en la Statuto, en la jaro 2011 AAIE devos elekti Prezidanton, Vic-Prezidanton, kaj Korespondan Sekretarion por unujaraj deĵor-periodoj kaj en la jaro 2012 devos elekti ĉiujn kvin postenulojn por trijaraj deĵor-periodoj.

Ron Glossop
Prezidanto

- Pri membreco en ILEI: Ĉiu membro de AAIE estas aŭtomate membro de ILEI ĉar la AAIE-jarkotizo inkluzivas kotizon por ILEI. Tamen kelkaj AAIE-anoj pagis sian ILEI-kotizon aparte. Do, la AAIE-estraro interkonsentis ke la AAIE-jarkotizo por tiuj membroj estu $9 por elektronika sendado de la Bulteno kaj $16 por papera sendado.
- Bonvenon al nova membro **Chuck Mays** el Raleigh NC!
- Ĉijare ni voĉdonos por Kasisto kaj Eduka Sekretario, ĉiu por dujara deĵor-periodo. Bonvolu tuj plenumi kaj sendi

## Teaching Suggestions

Kiel trakti **"interproksimigon de kulturoj"** en la klas-ĉambro?

Jen konsilo de **Duncan Charters**, nova vicprezidanto de ILEI, en sia artikolo "Kongresa temo: Interproksimigo de Kulturoj" (*Esperanto* marto 2010):

"Kiam instruado okazas en la kunteksto de la deviga lernado de fremda lingvo, la lernantoj povas reagi kontraŭ tiu lingvo kaj kulturo kaj ĝiaj parolantoj, se ili sentas sin minacataj de la 'fremdeco' kompare kun la propra, akaceptita kulturo, kiu fariĝis por ili vivnormo. Nepozitiva sperto pri alia kulturo emas refortigi stereotipojn kaj anataŭjuĝojn, aparte se lernanto juĝas tion tempoperdo kompare kun pli agrablaj okupoj. Kiom ni atentis, en tipaj lingvoklasoj, konsciigi lernantojn pri la valoroj kaj sintenoj kiujn ni havas komunaj kun reprezentantoj de aliaj kulturoj, kaj kiom ankaŭ tio helpus al vera interproksimigo de kulturoj?...

"En klasejoj 'multkulturaj' laŭ konsisto aŭ lernoceloj, sukcesaj instruistoj scias ke necesas respektigi la tradiciajn kaj aktualajn kulturvalorojn de la lernantoj. Multaj trovis ke nur tiel ili povas konsciigi tiujn lernantojn ke aliaj kredaroj, moroj, kondutmanieroj havas sencon, se oni komprenas la tradiciojn kaj vivbezonojn de la alia popolo…"

AAIE-membro **Enrique Ellemberg** konsilas jene:

"Mi kredas ke multege da homoj malkovras Esperanton ĉiutage. Multaj el ili lernas la lingvon, aŭ nur kelkajn lecionojn. Sed la plejmulto ne restas kiel Epseranto-uzantoj. Ni devas trovi manieron por ke tiuj kiuj atingis ian nivelon, daŭre uzu Esperanton. Pro tio mi jam de pli ol 10 jaroj, kreas retpaĝojn por 'lerni kaj uzi Esperanton'.,, Ĉefpaĝo: <http://esperatofre.com>"

## ILEI Matters

Jen kelkaj aparte interesaj artikoloj en numero 10/1* de la *Internacia Pedagogia Revuo*, oficiala organo de Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj (ILEI):

a) La ĉefaj projektoj de ILEI por 2010 (paĝo 4)

b) Biografio de nova vic-prezidanto **Duncan Charters** (p. 7)

c) Du trejnseminarioj por Esperanto-instruistoj kaj instruemuloj (p. 11)

d) Raporto pri instrua vojaĝo de Ĉinio, kun fotoj—de **Ron Glossop** (p. 33-36)

*Se vi pagis vian AAIE-kotizon por 2010 sed ne ricevis numeron 10/1 de *IPR*, bonvolu informi la redaktoron, por ke ŝi sendu ekzempleron al vi.

Nia prezidanto **Ron Glossop** estas nun la Usona Sekciestro de ILEI.

## Esperanto-Instruado en Usono

- This year's world-famous 3-week summer Esperanto course NASK (Norda Amerika Somera Kursaro) will be held June 27-July 16 at the University of California in San Diego. There will be intermediate and advanced classes, with five college credits each. For details contact Ellen Eddy <EddyEllen@aol.com> phone (360) 754-4563.
- Dr. Gertrude Novak taught a 7-week beginning Esperanto course at Malcolm City College in Chicago last January-February under the auspices of Continuing Education. Two people completed the course.

**Enrique Ellemberg** skribis jene pri sia instruado de Esperanto per la reto:

"Mi lernis Esperanton en Rosariio, Argentino, en aŭgusto de 1959…Miaj unuaj provoj instrui Esperanton komencis eble antaŭ iom pli ol 20 jaroj, kiam mi loĝis en Novjorko urbo…Mi publikigis mian unuan retpaĝon la 18an de julio de 1996. Ĝi estis kaj estas listo de homoj kiuj volas korespondi. Ĝi bone funkciis ĝis antaŭ du aŭ tri jaroj. Nuntempe estas multege da manieroj por kontakti aliajn esperantistoj, kaj mia listo malgrandiĝas.…

"Dum mi loĝis en Buenos Aires in 1999, mi kreis diskedojn por lerni Esperanton, en la hispana kaj angla lingvoj. Oni povas elŝuti tiujn diskedojn el miaj retpaĝoj:

*Angle*: elŝutu la dosieron DktA0004.zip (258 KB) el la paĝo:
http://esperantofre.com/eroj/ilo01a.htm

*Hispane*: elŝutu la dosieron DktH0809.zip (673 KB) el la paĝo:
http://esperantofre.com/eroj/ilo01h.htm

Tiam mi komencis krei mian retejon.
Hodiaŭ mia retejo estas sufiĉe vasta kaj pro tio kelkaj homoj hazarde trovas ilin…
Kiel meznivelan kurson, mi uzas "La Gerdan Kurson".
Ĝi estas en miaj diskedoj faritaj en la jaro 1999…
"Kurso de Esperanto" havas 12 lecionojn kaj Fina Ekzameno.
Mi taksas ke ĉiuj kiuj finas la bazan kurson iom kapablas uzi Esperanton. Se ili komencas uzi Esperanton, rapide ili atingas nivelon por babili rete per Esperanto.
Mi ankaŭ kredas ke tiuj kiuj finas nur 7 lecionojn, ankaŭ povas uzi Esperanton. Mi konas kelkajn homojn kiuj forlasis la kurson post kelkaj lecionoj, kaj poste mi renkontis ilin ĉe esperantaj renkontiĝoj, aŭ en la reto. Tio okazas post monatoj, aŭ jaroj.
Por kelkaj kiuj multe kaj rapide volas lerni Esperanton, la kurso povas esti iom malrapida, aŭ enuiga, kaj ili forlasas la kurson kaj daŭrigas per lernu.net aŭ aliaj kursoj, aŭ simple ili komencas babili, kaj lernas per eraroj.
Proksimume 60 elcento de miaj lernantoj parolas la hispanan … Proksimume 40 elcento de miaj lernantoj parolas la anglan. Ili venas el multege da landoj kaj la plejmulto el ili lernis la anglan kiel duan lingvon.

Ĉi tie mi montras miajn statistikojn por 2008 kaj 2009.

*2008 . . . . 301 petintoj . . . (kiel 6 petoj ĉiun semajnon)*
14 homoj atingis la 7an lecionon.
26 homoj finis la bazan kurson.
4 homoj atingis la 10an lecionon de *Gerda*
7 homoj finis *La Gerdan Kurson*
Mi trovis almenaŭ 3 homojn kiuj forlasis la kurson kaj poste parolis en Esperanto.
59 homoj lernis 7 lecionojn aŭ pli en 2008…

*2009 . .. . 260 petintoj . . . (kiel 5 petoj ĉiun semajnon)*
21 homoj finis la bazan kurson.
5 homoj finis *La Gerdan Kurson*.
2 homoj uzas [Esperanton]
46 homoj lernis 7 lecionojn aŭ pli en 2009.
Kelkaj el la homoj kalkulitaj ĉi tie, ankoraŭ sendas lecionojn. Kelkaj rekomencos la lernadon.

*2010. Dum la unuaj 4 monatoj mi jam ricevis 95 petojn…*

Ĉi tiuj rezultoj ne certigas progreson de Esperanto. Mi kredas ke multege da homoj malkovras Esperanton ĉiutage. Multaj el ili lernas la lingvon, aŭ nur kelkajn lecionojn. Sed la plejmulto ne restas kiel Esperanto-uzantoj.Ni devas trovi manieron por ke tiuj kiuj atingis ian nivelon, daŭre uzu Esperanton. Ni devas krei pli da manieroj por uzi Esperanton. Pro tio mi jam de pli ol 10 jaroj, kreas retpaĝojn por "lerni kaj uzi Esperanton".

Enrique Ellemberg
UEA delegito por Fremont, California, Usono
Ĉefpaĝo: http://esperantofre.com

## Recommended Reading

*Ĉiu havebla ĉe UEA (<www.uea.org>)*

*Ĉio Fareblas* Cholet. El la franca tradukis Martine kaj Christian Riviere. 16p. Tute taŭga kiel amuza rakonto por legi enlitiĝe. Sed malantaŭ la amuzo kaŝiĝas la celo komuniki al la infano (kaj ne nur) vivofilozofion adopti pozitivan perspektivon.

*Ĉu mi malplaĉis al vi?* Marie-France Conde Rey. 20p. Prezentas tre kortuŝan rakonton pri neatendita rompiĝo de interamika amo. Ĝi helpas al juna infano kompreni ke ankaŭ aliaj spertas similajn dolorojn, kaj ke tamen ja estas iaspeca solvo. La bildoj estas nigrablankaj kaj kvazaŭ invitas infanon ilin kolorigi.

*Pasporta Servo 2010*. TEJO- 208p. Enhavas adresojn de 1,450 Esperantistaj gastigantoj en 91 landoj. Krom la adresoj troviĝas mapoj kaj informoj pri la gastigantoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo.

*Rim-Enigmo*j de Elena Popova. 52p. If you're teaching a child Esperanto, this can be a good book to work on together. You can try to solve the puzzles while the child colors the pictures. Simplaj rimoj, kiujn oni kompletigu per mankantaj vortoj—besto aŭ floro, ĉielarko aŭ luno… Kun ĉarmaj ilustraĵoj, kaj solvoj en 13 lingvoj. $10.70 de Esperanto-USA.

*La naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro de la Akademio* ĵus aperis. El la 209 novaj radikoj, po unu el kvin estas zamenhofa radiko kaj nur 25 (interalie tri lando/ popolonomoj, el kiuj neniun entenas PV, aperis unuafoje en PIV. Sed la difinoj nun ricevis precizigon, aktualigon, kaj detaladon. Aperis novaj fakoj: ekologio, komputado, seksaj vortoj.

# Esperanto-Instruado Alilande

In the city of Votla Redonda (Rio-de-Janejro) in **Brazil**, there have been free Esperanto courses, sponsored by the Association of Retired Persons, for 11 years. Each course lasts 7 monhs, with lessons every Wednesday from 8:30 to 10:00 AM, including a coffee break. The Association considers these lessons good therapy for both young and old. This year's course began April 29th.

Ever since 1951 there have been courses taught in Esperanto by world-renowned instructors at the Gresillon Castle in western **France**. This year classes are scheduled from July 17 through August 14 and will include such subjects as astronomy, book-binding, and theater, as well as lessons in the language itself. For details go to

http://www.gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo

Favora prezo validas ĝis la fino de majo. Infanoj manĝas duonpreze.

Ĉiuj prezoj tie:

http://www.gresillon.org/spip.php?rubrique15&lang=eo

Aliĝilo kun pliaj informoj legu kaj printu de tie:

http://bertox.free.fr/g/Gresillon2010.pdf

Twelve people signed up for the January-through-April Esperanto classes sponsored by International Tourism and Culture Studies in Bydgoszcz, **Poland**, featuring lecturers from Australia, Albania, Belgium, Bulgaria, China, the Congo, Latvia, Lithuania, Mongolia, Russia, Tanzania, the Ukraine, and Poland.

In March at the Zamenhof Institute in Lome, **Togo**, 97 out of a total of 103 students completed the second trimester, 39 in the elementary course and 58 in the intermediate.

Last February 16 members of an Esperanto class at the Einstein High School in Rotterdam, **The Netherlands**, visited the Central Office of the Universal Esperanto Association in the same city.

Beginning in the fall of 2009 the National **Austrian** Library and the Youth Literature Institute have established a special program, during which a thousand elementary-school students have taken a tour of the Esperanto Museum in Vienna which included a "crash" course in Esperanto.

Last November, as a result of an international project called "Friendship Guidebook", school children and their teachers from France, Poland, and Hungary visited the **Bulgarian** city of Polski Transbes, using Esperanto to communicate. The program included Bulgarian folk-dancing, and computer, mathematics, football, basketball, and badminton contests.

Two groups of children (one from the city of Zhenjiang in Jiangsbu province) actively participated in the national Esperanto convention in Nankin, **China**. Included was a public Esperanto lesson, which featured an internet chat with a Brazilian Esperantist.

Last year an Esperantist from **Belgium** taught Esperanto a total of 44 hours in 6 cities in Indonesia, 2 in elementary schools, 2 in high schools, 2 in colleges, 3 in universities, and 1 in a museum. All told, almost 500 children, students, and adults participated. Included in the study materials was "Poŝamikoj", and those who were in class only one or two hours received material for further study.

Last September there were 16 students in an Esperanto class in the Kálmán Kalocsay High School in Bercei, **Hungary**. Kalocsay was of course a respected Esperanto poet who wrote under the pseudonym Peter Peneter as well as his own name, edited *Literatura Mondo*, and co-authored (with Gaston Waringhien) *La Plena Gramatiko de Esperanto*.

# From and About Our Members

**Allan Boschen** (Windsor MA) raportis pri la sukcesa reklamado de Esperanto per inter-reta konkurso ĉe <www.change.org/ideas> pasintan februaron kaj marton. Temas pri sendi al Prezidanto Obama ideojn pri indaj ŝanĝoj en 20 kategorioj, unu el kiu estis Edukado. Unu propono en tiu kategorio estis ke oni instruu Esperanton en Usonaj elementaj lernejoj kiel enkonduko al la studado de aliaj lingvoj. Kiam oni voĉdonis, oni rajtis inkluzivi komentojn. Jen unu de **Sally Lawton** (Westhampton MA):

"Esperanto is appropriate in elementary grades when kids learn a languge most easily… No one knows what language a child will need as an adult, so the important thing is to have a positive foreign language learning experience, to not get stuck with one system of phonetics and grammar, vocabulary as is the usual case in our basically one language land. To be prepared in later life to learn whatever new language may be useful then. School learning is practise but not necessarily practical."

**Sherry A. Wells** (Royal Oaks MI) earned a teaching degree with a minor in Spanish, but was confronted by a "teacher surplus" and so never formally taught except for law at paralegal classes and … Esperanto, every opportunity she could get or make, since first learning it in 1987. In March she wrote:

Mi vizitos Minneapolis en marto por prelegi pri Esperanto al Central States Fremda Lingva Konferenco…"

She recommends the following readings:

*The 5 Minute Linguist: Bite-sized Essays on Language and Languages*, edited by E. M. Rickerson and Barry Hilton, contains 60 essays with intriguing titles. The last two are "Whatever happened to Esperanto?" by Rickerson, and

"Does anybody here speak Klingon?" by Christopher Moseley, which also mentions Esperanto as it discusses artificial languages.

Rickerson's last three sentences are, "With Esperanto already thriving in many places and in so many ways, the time may be right to think again about its possible role in international communication. In a newly-interconnected world, why shouldn't more of us learn Esperanto as a second language? It's quick it's easy, and—thanks to the Internet—it can be used worldwide"

On January 9 this year at the main office of the Universal Esperanto Association in Rotterdam, **Humphrey Tonkin** (West Hartford CT) was presented with a copy of the book *The Art of Working Together* (*La Arto Labori Kune*), published by UEA in honor of his 70th birthday. In *Esperanto* (February 2010) he wrote:

"Mi aparte ĝojis pri la titolo de la verko…. Se ion ajn mi klopodis kaj klopodas parktiki en mia Esperanto-vivo (kaj espereble en la vivo ĝenerale) tio estas trovi la bonon en la homoj kaj eviti la malbonon; trovi la harmoniemon, sur kiu eblas fari kolektivan laboron, kaj eviti la kverelemon kiu kondukas malen…Se oni ne ĝuas la laboron por Esperanto, oni ne laboras kune sed laboras pune…"

# Kunlaboro

The American Association of Teachers of Esperanto is listed in the annual *Directory of the Modern Language Association of America*.

The annual convention and World Languages Expo of the American Council on the Teaching of Foreign Languages will take place November 19-21, 2010, at the Hynes Convention Center in Boston. <www.actfl.org>

# Kalendaro

**Majo 2010**

*28-31* **Kongreso de Esperanto-USA** - Bethesda MD <www.esperanto-usa.org>

*29* *(je la 1-a ptm)* **Jarkunsido de AAIE**: Kadre de la kongreso de Esperanto-USA

**Junio 2010**

*5-9* **Esperanto-Karavano per la Trans-Siberia Trajno** tra Rusio. Komuna vojaĝado survoje al la Azia Esperanto-Kongreso en Mongolio. *(http://mongolio.info/?page_id=539)*

*19-21* **Verda Domo de Arizona**. Internacia Montara Tendumo proksime al la Granda Kanjono. Dume okazos Indiĝena Indiana festivalo. (angelinata@aol.com)

*27 junio -16 julio* **NASK (North American Summer Courses)** - UC San Diego (Ellen Eddy <eddyellen@aol.com>)

**Julio 2010**

*2-10:* ***SES 2010 (Somera Esperanto-Studado)*** - en Piesfany, Slovakio kun la tria renkontiĝo de Lernu!-uzantoj. Dum SES 2010 okazos la seminario "Flugiloj de malfacila vento" kaj ekzameno de Komuna Eŭropa Referenckadro. <ses@lernu.net>

*11-17:* **ILEI-Konferenco** - Ĉe hotelo Canimao, Matanzas, Kubo (http://www.ilei.info)

*17-24*: **95-a Universala Kongreso** - En Havana, Kubo. Temo: Interproksimgo de Kulturoj (<uea@co.uea.org>; www.uea.org)

*24-31* **66-a Junulara Kongreso** - Ĉe feriejo Los Cocos, Santa Cruz del Norte, Havano, Kubo (http://www.tejo.org/ijk/2010)

31 julio - 7 aŭgusto **Someraj kursoj (semajna staĝo) en kastelo Greziljono**, Bauge, Francio. Diversnivelaj kursoj kaj kromaj aktivaĵoj. (kastelo@gresillon.org)

**Aŭgusto 2010**

2-11 **Somera Seminario de ILEI** - Ĉinio en Taiyuan. Por E-instruistoj kaj instruemuloj kiuj matene prelegas kaj posttagmeze instruas, babilas, prezentas, ludas. Du ekskursoj duontagaj. Ĉefa celo: lerni aliajn instruajn metodojn kaj paroligi ĉinajn esperantistojn. Alilandanoj bonvenas. (arko.gong@qq.com)

**Oktobro 2010**

*8-10* **Torpedo-6** - ILEI Seminario pri projektoj kaj subvencipetado kaj 48-a stud-sesio kun KER-ekzamenoj en Herzberg, Germanio (urbo kiu oficiale nomas sin die Esperanto-Stadt: la Esperanto-Urbo) (esperanto-zentrum@web.de)

*9-11* **Aŭtuna renkontiĝo de Esperanto (ARE)** - en Sylver Bay, Lake George, NY, Usono. Amikeca semajnfino, kun kursoj, prelegoj, ludoj, ktp sur belega loko ĉe lago. (Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaŭ, Montreal, Quebec, Kanado. H2G 2R8. <informo@esperanto.qc.ca>)

*22-24* **Course-You-Can**, Barlastono, Britio. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj/komencintoj. Samtempe okazos 'Drondo', semajnfina Esperant-lingva diskutrondo pri diversaj temoj. Spertuloj kunvenigu nespertulojn! (eab@esperanto-gb.org)

**Novembro 2010**
*19-20* **American Council on the Teaching of Foreign Languages** - Boston MA (www.actfl.org)

**Majo 2011**
*18-21* **Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto** en Kingston, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino, vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. (Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montreal, Quebec, Kanado, H2G2R8)

**Junio 2011**
*2-5* **Landa Kongreso de Esperanto-USA** - Berkeley, Kalifornio, apud San Francisko (rglossop@mindspring.com)

**Julio 2011**
*23-30* **96-a Universala Kongreso de Esperanto** en Kopenhago, Danio.

*NOTO: Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe: www.eventoj.hu/kalendar*

# Pri Ekzamenoj

**U.S. Esperanto examinations** are available on three levels: Beginning (Komencgrada), Intermediate (Mezgrda) and Advanced (Supera). They are for English speakers only, since all instructions and translations involve English. And they may be taken any time anywhere if the prospective examinee can find a dependable administrator (e.g. a teacher or other resposible adult who speaks English).

These tests are also available at U.S. national Esperanto conventions, including the Esperanto-USA meeting in Bethesda, Maryland, where they will be administered beginning at 2 pm on Saturday, May 29. If you wish to take one, please notify Dorothy Holland beforehand (<dorothyjeanh@gmail.com>; 805-967-5241).

**UEA-ILEI examinations**, which have three levels (B1, B2, and C1) are completely in Esperanto, and are given by specially trained administrators. Last year 126 Esperantists took them at 10 different locations, and this year they will be available at NASK in San Diego between June 27 and July 16 and at the UK in Havana, Cuba, July 17-24. For complete information see <www.edukado.net>.

# Anoncoj

Se vi volas ekzameniĝi ĉe la Usona Esperanto-kongreso en Bethesda sabaton, la 29-an de majo, tuj anoncu vin al Doroteo (805-967-5241 aŭ 805-967-5241).

Se vi partoprenos la Usonan Esperanto-kongreson, nepre ĉeestu la jarkunsidon de AAIE sabaton, la 29-an de majo.

If you teach Esperanto during the coming year, please complete the form on page 10 and send it to our Education Secretary, Sherry Wells.

Nepre sendu viajn du balotilojn tuj (vidu paĝon 9).

The deadline for receiving your contributions to the next Bulletin is September15. We would especially appreciate information about any Esperanto classes you are teaching, as well as your suggestions for effective techniques for teaching Esperanto.

# Jar-raportoj de Niaj Estraranoj

## De nia Prezidanto, Ron Glossop

Ĉe la 2009-jarkunsido en Sankta-Luiso je la 24-a de Majo estis reelektita tri funkciuloj: Prezidanto Ronald Glossop, Vic-Prezidanto Gary Grady, kaj Koresponda Sekretario Sally Lawton. Kasisto Mary Napolitan kaj Eduka Sekretario Sherry Wells daŭris en siaj dujaraj deĵor-periodoj. Redaktoro Doroteo Holland ankoraŭ faris la tre gravan taskon de la redaktado de nia BULTENO.

La plej grava eduka projekto por Esperanto en Usono estas la Nord-Amerika Somera Kursaro kiun Ellen Eddy administras kaj Grant Goodall direktas. Ĝi nun okazas ĉe la Universitato de Kalifornio en San-Diego. En la jaro 2009 la datoj estis de la 29-a de Junio ĝis la 18-a de Julio. La profesoroj/instruistoj estis Spomenka ŜTIMEC el Kroatio, kaj David JORDAN kaj Lee MILLER el Usono. Hoss FIROOZNIA el Usono estis la Helpinstruisto. En la jaro 2010 NASK okazos ekde la 27-a de Junio ĝis la 17-a de Julio denove ĉe la Universitato de Kalifornio en San-Diego (UCSD). La profesoroj/instruistoj estos el Israelo Amri WANDEL, el Nederlando Katalin KOVATS, kaj el Usono Duncan CHARTERS, Grant GOODALL, Orlando RAOLA, kaj Lee MILLER.

En Julio AAIE-membroj Duncan CHARTERS, Lusi HARMON, kaj Vilĉjo HARRIS partoprenis la ILEI-konferencon en Krakovo, Pollando. Tie Duncan estas elektita Vic-Prezidanto de ILEI. La nova Prezidanto de ILEI estas Stefan MACGILL el Hungario. La aliaj ILEI-estraranoj estas Sekretario Malgosia KOMARNICKA el Pollando, Estrarano pri Financoj Julija BATRAKOVA el Rusio, Zsofia KORODY el Germanio, Radojica PETROVIC el Serbio, kaj Julian HERNANDEZ el Kubo.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) adoptis novan regulon kiu deklaras ke la Prezidanto de ĉiu landa sekcio estos ankaŭ la Sekciestro por ILEI. Parte pro tio, post multaj jaroj Doroteo Holland rezignis kiel ILEI-Sekciestro por AAIE. Sekve ekde nun la Prezidanto de AAIE estos la ILEI-Sekciestro por AAIE. Bedaŭrinde mi, kiel AAIE-Prezidanto kaj ILEI-Seksciestro por AAIE, ĝis nun ne certas ĉu mi ricevos permeson iri al Kubo por partopreni la venontan ILEI-konferencon kaj la Universalan Kongreson.

ILEI volas ke la landaj Sekciestroj havu tiun respondecon dum trijara periodo kiel ankaŭ estas la situacio por la ILEI-estraranoj. Mi proponas ke AAIE ŝanĝu nian AAIE-Statuton por fari la saman en nia landa asocio. Mi rekomendas ke ne nur la Prezidanto sed ankaŭ ĉiuj AAIE-funkciuloj havu trijaran deĵor-periodon. Estas rimarkinde ke dum la pasintaj du jaroj mi ne povis trovi homojn kiuj servus kiel Kandidatiga Komitato. Mi mem devis fari tion. Mi opinias ke estus pli bone havi unu gravan Kandidatigan Komitaton je ĉiu tria jaro kiu havus la respondecon kandidatigi ĉiujn kvin AAIE-funkciulojn. Estus unu teamo kiu gvidos la organizon dum tri jaroj. Tamen AAIE ne povas fari tiun ŝanĝon en unu jaro. Mi rekomendas ke en la nuntempa jaro (2010), laŭ la ekzistanta AAIE-Statuto ni elektu Kasiston kaj Edukan Sekretarion por dujaraj deĵor-periodoj. Se AAIE adoptus mian sugestitan ŝanĝon en la AAIE-Statuto, en la jaro 2011 AAIE devos elekti Prezidanton, Vic-Prezidanton, kaj Korespondan Sekretarion por unujaraj deĵor-periodoj. En la jaro 2012 la nova sistemo komenciĝos laŭ kiu ni devos elekti ĉiujn kvin postenulojn por trijaraj deĵor-periodoj. Ni diskutos ĉi tiun rekomendon dum la 2010-jarkunsido en Vaŝingtono.

Mi tre ĝojas ke rilate al la venontaj du jaroj Sherry Wells konsentis denove esti kandidato por Eduka Sekretario, kaj nova AAIE-membro Chuck Mays konsentis esti kandidato por Kasisto. Ankaŭ Doroteo Holland daŭros kiel la Redaktoro de nia BULTENO.

Rilate al aliaj agadoj de nia organizo dum la jaro, ni havas la raportojn de aliaj funkciuloj. Mi tre dankas ilin pro la granda laboro kiun ili faris dum la pasinta jaro. Mi aparte volas danki al Kasisto Mary Napolitan kiu laboris kiel AAIE-Kasisto dum ses jaroj sed ne plu havos oficialan postenon.

Mia ĉefa zorgo estas ke ni ne multe instruas Esperanton en Usono eĉ kvankam la lernantoj en niaj elementaj kaj meznivelaj lernejoj multe bezonas ĝin.

Je la fino de mia raporto, mi menciu miajn proprajn agadojn por Esperanto. Dum kvar tagoj en Junio 2009 mi propagandis kun aliaj Esperantistoj ĉe la kongreso de la Unitarian-Universalista Eklezio en Sallaga Urbo. En Julio mi estis studento en NASK dum tri semajnoj. Dum la monato Aŭgusto mi instruis Esperanton en Ĉinio. Survoje hejmen de Ĉinio mi haltis en Rumanio dum unu semajno en Septembro por fari prezentaĵon pri Esperanto ĉe la kongreso de la Internacia Konsilio de Unitarianoj-Universalistoj. En Oktobro mi ĉeestis la Aŭtunan Renkontiĝon de Esperanto en Lago Georgo, Novjorkio kaj tie faris parolon pri miaj spertoj en Ĉinio. En Aprilo 2010 mi prelegis ĉe Iowa Wesleyan College pri "Mondcivitaneco en la 21-a Jarcento" (kompreneble oni uzus Esperanton) kaj ankaŭ parolis pri Esperanto en du klasoj. En Junio mi instruos unu-semajnan klason pri Esperanto por infanoj en Edwardsville, Illinois. Mi ankaŭ aktivas en mia loka Esperanto-klubo.

## De nia Vic-Prezidanto, D. Gary Grady

Dum la pasinta jaro mia laboro por AAIE konsistis plejparte el tri aferoj: Mi verkis la rubrikon pri Esperanto-instruado en *La Usona Esperantisto* (organo de Esperanto-USA), starigis kaj de tempo al tempo aktualigis niaj retejon ĉe http://aaie.us, kaj respondecis pri la formato/aspekto de ĉi tiu *Bulteno*.

Mi volus peti helpon de la membroj de AAIE pri du aferoj:

Unue, se vi havas sugeston por temo taŭga por la rubriko pri instruado en *Esperanto-USA*, bv informi min. Se vi mem volus "gast-verki" la rubrikon, des pli bone!

Due, estus utile havi pli ol unu homon por respondeci pri la retejo de AATE. Ni uzas tre facilan "viki-ecan" sistemon, do tute ne necesis scipovi teknikajn komplikaĵojn.

Bv skribi al mi ĉe DGaryGrady@verizon.net.

## De nia Kasisto, Mary Napolitan

Kasista Raporto, 6-3-2009 ĝis 5-3-2010:

*Komenca Saldo 6-3-09*..........................................*$3921.96*

Enspezoj
- Kotizoj.........................................................780.00
- Saldo post enspezoj..........................................4701.96

Elspezoj
- Transdono de kotizoj al ILEI...................966.68
- Bultenoj.....................................................76.29
- Sume............................................................... -1042.97

*Fina Saldo 5-3-10*................................................ *$3658.99*

## De la redaktoro de nia *Bulteno*, Doroteo Holland

Aperis du numeroj:

B-181-182 okt. 2009; kosto $41.89
B-183 feb. 2010; kosto $34.40

Kutime ni havas kvar numerojn. Mi pardonpetis ke tio ne okazis pasintjare, kaj esperas ke estontjare la kutima ritmo reaperos.

Mi volas aparte danki al D. Gary Grady, kiu fidele kaj lerte formatis ĉiun *Bultenon*, kaj zorgis pri ĉiu elektronika sendado.

## De nia Eduka Sekretario, Sherry Wells

**Esperanto at Foreign Language Conferences (continued)**

In March, I presented at the Central States Conference in Minneapolis. I stayed with Joan Phillips for the week. Susan Alexander drove down from Duluth for the gathering at the end of my session (and for my talk at the U.U. Church the next morning).

One session I attended had been named among the Best of Iowa. Paul Brener is originally from Argentina. He easily involved us adults in fun, creative activities, which were feasible in a classroom. He mentioned how they could be used for Spanish, French, and with a sly grin, Esperanto ! He is energetic, intelligent, charming, would be a plus anywhere and very much wants to attend NASK. Waldorf Schools do not pay as well as public schools so the Schulze Education Fund is assisting him to do so. I predict he will be an excellent investment.

At the Exhibit hall reception, one teacher told me she had a copy of *Mil Vortoj*.

My own session was scheduled for the last period and drew few attendees. Two impressed me because they were still in college, which could mean that when they encounter as teachers those situations I spoke about, they'll think of Esperanto as a solution. Paul Brener came to it, too, as did some local Esperantists.

In April, I was in Columbus for the Ohio Foreign Language Assoc. conference. This was my most exciting and gratifying yet!

One teacher could not resist stopping in on her way to another session. "Esperanto! I self-learned that years ago!" She was from China and said, "Many people in China are learning it." I showed her the 2004 Beijing Kongreso book in Esperanto with its gorgeous photos. Everyone present heard what I couldn't have planned any better.

One of my roommates, Rachel Rodriquez from Spain, had studied every page of *Mil Vortoj*, while in our room, looking for words similar to Spanish. She came to my session, "Of course!" (The other woman had to leave early for an evening with her daughter or she would have been there.)

One teacher said her grandmother, who lived to age 103, towards the end was babbling in something they finally figured out to be Esperanto. She had been born in Bialystok. "Wait until I tell my family about this session!"

Another teacher was there because my blurb had talked of Esperanto for children with learning differences. Another recently joined our listserv and has family in the DC area, so he might attend the U. S. Kongreso.

And again, Aminda and I presented at Michigan State University's World Languages Day. She tells people how much fun her first language is and about the St. Louis Kongreso, with more youth of any she'd attended, and the DC one coming up. One family also attended the session about endangered languages, as I did. A presenter summed up our groups and obviously that family had mentioned Esperanto in theirs. I gave the 4 presenters copies of my handout and pointed out the Vision Statement of the Esperantic Studies Foundation.

Nun, mi deziras viajn opiniojn. One attendee suggested a session teaching Esperanto. I propose to adapt the title used by last year's Japanese tutoring roommate: "Esperanto in an Hour." However, at this point, I want to no longer feel like Don Quixote without a Sancho Panza. I want others' moral support at least for continuing. I also might need modest financial assistance. (Presenters are generally required to join and register—$75 to $135 per conference. I attend nearly every session to make the most of it, as I've reported. I stay with Esperantists, get roommates or use hostels or Motel 6, though there is still a cost, and travel by auto, train, or Megabus. I try to tell a Rotary Club about Esperanto for a free meal. But I live in Michigan—the hardest hit state by this economy.)

Contact me at esperantosherry@tm.net about this and a copy of both handouts.

## De nia Koresponda Sekretario, Sally Lawton

La membroj de AAIE kiuj jam kotizis por la jaro 2010 estas 26, kaj la membroj kiuj estas Dumvivaj estas 20. Entute estas 46 ĝis nun. Estas kelkaj anoj de 2009 kiuj eble pagos poste aŭ ĉe la jara kongreso kiel okazas kutime.
14 membroj kaj unu DV membro elektis ricevi elektronike.
Jen estas la nunaj anoj: Aronson, Blum E, Boschen DV, Casey, Charters DV, Cook DV, Danhof E, Dorcas, Phil DV, Dorcas, Elizabeta E, Eddy DV, Ellemberg E, Firooznia E, Glossop DV, Goldberg DV, Grady, Harmon, Lusi E, Harris DV E, Holland, Jordan DV, Keeble, Knudsen DV, Kolker E, Lawton, Lieberman DV, Marks, Massey DV, *Mays E, Miller, R. D. DV, Napolitan E, Novak, Nuessel E, Pannell, Parlan DV, Prystupa, Rish DV, Roff DV, Rusch, Saghafian, Studer E, Tonkin, Torres E, Victor, Wells E, Wheeler DV, Williger DV.
Estis unu nova ano kiu aniĝis februare, Charles (Chuck) Mays. Kompreneble oni esperas ke ni povos bonvenigi aliajn novajn anojn dum la ĉhijaraj monatoj kiuj restas.

Respekteme
Sali Lawton
Koresponda Sekretariino

## Pri la Perkoresponda Esperanto-Kursaro

de la 1-a de majo, 2009, ĝis la 1-a de marto, 2010

Ĉijare entute aliĝis 3 novaj kursanoj, unu finstudis kaj 97 teorie ankoraŭ lernas, kvankam la plej multaj ne aktivas. (Lastjare aliĝis 6 novaj.) Jen la detaloj:

NIVELO 1: 2 novaj kursanoj aliĝis; finstudis neniuj kaj entute estas nun 57 kursanoj.

Fidele deĵoris kiel instruanto E. James Lieberman. (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas *Jen Nia Mondo I*, kun sonbendo.

Kurs-kotizo: $63, el kiu la instruanto ricevas $16.50 kaj la administranto $3.00.

NIVELO 2: Unu nova kursano aliĝis, 1 finstudis (Archie Bullington, Scottsville KY), kaj nun 26 ankoraŭ lernas.

Instruanto: E. James Lieberman (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas *Jen Nia Mondo II* kun sonbendo.

Kurs-kotizo: $63, el kiu la instruanto ricevas $16.50; la administranto, $3.

NIVELO 3: Neniuj kursanoj aliĝis kaj neniuj finstudis. Lastperiode 2 aliĝis, kaj neniuj finstudis. Entute estas nun 5 kursanoj; lastjare, 6.

Instruanto: Doroteo Holland (Santa Barbara CA)

La lecionoj baziĝas sur la unua duono de *Vojaĝo en Esperanto-Lando* de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: $73.75

NIVELO 4. Neniuj novaj kursanoj aliĝis; neniuj finstudis ĉijare; same lastjare; ankoraŭ restas 5 kursanoj. Lastjare same. La administranto pretas instrui se venos novaj kursanoj.

La lecionoj baziĝas sur la lasta duono de *Vojaĝo en Esperanto-lando*. de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: $73.75

Mi planis sendi al ĉiu kursano demandaron pri ĉu oni intencas daurigi la kurson, sed la poŝta kosto de tio estus $42.68, kiu estas pli ol nia nuna saldo.

Estas kuraĝige ke ĉijare aliĝis 3 novaj kursanoj. Tamen, plejparte nur tiuj kiuj ne havas aliron al komputilo (ĉefe maljunuloj) interesas pri paperaj perkorespondaj kursoj ĉar kutime junuloj kiuj volas lerni Esperanton turnas sin al la reto (<edukado.net> kaj <lernu.net>).

**Financa Raporto de la Perkoresponda Esperanto-Kursaro**

*Komenca Saldo la 1-an de majo 2009..............  ........$29.42*

Enspezoj
- Ricevita de Esperanto-USA....................... 55.50
- Sume............................................................. ....... +55.50

Elspezoj
- Al instruatoj por novaj kursanoj.................49.50
- Por poŝto de la administranto.......................5.15
- Al kaligrafiisto (po $5)................................5.00
- Sume........................................................... ........ -59.65

*Fina Saldo la 1-an de marto 2010.................... ........$25.27*

Doroteo Holland
Administranto, Perkoresponda Esperanto-Kursaro
Sub la aŭspicio de Esperanto-USA kaj
Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

## Jar-Raporto de la Usona Ekzamena Servo

de la 1-a de majo, 2009 ĝis la 1-a de majo, 2010

Haveblas ekzamenoj je tri niveloj: Komencgrada, Duagrada, kaj Supera. Informojn pri la enhavo de ĉiu nivelo oni povas ricevi kontraŭ peto al la administranto. Ĉar la instrukcioj por la administranto kaj la ekzameniĝonto estas en la angla lingvo, la ekzamenoj taŭgas nur por personoj kiuj scipovas la anglan. La kotizo estas $10. Ĉiu kiu sukcesas ricevas oficialan atestilon. Eblas ekzameniĝi ie ajn iam ajn; ekzemple: Apud via hejmo (necesas nur trovi administranton kiu scipovas la anglan, kaj antaŭe sendi al la administranto ties nomon kaj adreson kaj dek dolarojn); ĉe Esperanto-kongreso (se oni antaŭe anoncas sin); aŭ ĉe lernejo kie oni instruas Esperanton.

Ĉiperiode ses ekzameniĝis, ĉiuj ĉe la landa kongreso en Sankta Luiso la 24-an de majo, Nur unu (Marie Tarallo el Chicago IL) ekzameniĝis per la *Komencgrada Ekzameno*, kaj ŝi sukcesis. Lastjare ekzameniĝis 6 per la Komencgrada Ekzameno.

Ĉijare 5 ekzameniĝis per la *Duagrada Ekzameno*, Bedaŭrinde, pro teknika problemo kun la sonbendo, nur 2 kompletigis la ekzamenon en St. Louis kaj ambaŭ sukcesis: David Koch (Bollivar OH) kun honor kaj Tina Seastrom (Evanston IL). La aliaj 3 serĉas lokan administranton por Parto I.  Lastjare nur unu  ekzameniĝis per la Duagrada.

Neniuj ekzameniĝis per la *Supera Ekzameno* ĉijare aŭ lastjare.

[La internaciaj ekzamenoj de ILEI-UEA estas tute en Esperanto; haveblas je tri niveloj; estas administrataj nur de Esperantistoj kiuj ricevis specialan trejnadon; kaj okazas nur ĉe Esperanto-kongresoj aŭ konferencoj. Aranĝas ilin speciala internacia komitato.]

**Financa Raporto de Usona Ekzamena Servo**

*Komenca Saldo la 3-an de majo 2009.............. ......$434.99*

Enspezoj
- 6 kotizoj po $10 ricevitaj.........................................60.00
- Saldo post enspezoj.................................... ........494.99

Elspezoj
- Por kaligrafio (po $5)................................10.00
- Por poŝto de la administranto....................17.79
- Sume........................................................... ........ -27.79

*Fina Saldo la 1-an de marto 2010.................... ......$467.20*

**Historia noto**: Ek de septembro1963, 1,300 personoj ekzameniĝis per la Usona Ekzamena Servo.

Doroteo Holland
Administranto, Usona Ekzamena Servo
<dorothyjeanh@gmail.com>; (805)967-5241
5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521
Sub la aŭspicio de Esperanto-USA kaj
Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

# American Association of Teachers of Esperanto

DUOBLA BALOTILO

*Indiku viajn elektojn per ikso (x)*

## A. Por AAIE-estraranoj

Por Kasisto (2-jara deĵoro de majo 2010 ĝis majo 2012):

Chuck Mays [Nova membro el Raleigh NC] _____

___________________________________* _____

Por Eduka Sekretario: (2-jara deĵoro de majo 2010 ĝis majo 2012)

Sherry Wells ______

___________________________________* _____

*Write-in candidates must present written confirmation that they are willing to run.

## B. Pri Honora Membro

La jena petskribo subskribita de pli ol unu kvarono de la membraro estis ricevita:

*La membraro de AAIE volas deklari ke Doroteo Holland estas "Honora Membro de AAIE" kaj ne plu devos pagi membrecon por AAIE aŭ ILEI.*

Ĉiu AAIE-membro rajtas voĉdoni JES axu NE rilate al tiu propono. Se la plimulto voĉdonos JES, la propono estos adoptita.

_____ Jes _____Ne

INSTRUCTIONS

1. Put your completed ballot in a small unmarked envelope.

2. Put the unmarked envelope in a larger one showing your name and reurn address. On the outside of the large envelope write BALOTILO.

3. Mail your completed ballot to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton MA 01027, so that it will reach her **no later than Thursday, May 27 , 2010**. Or bring it to the AATE annual meeting in Bethesda.

# American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR
Name Address ______________________________________________
Email address ______________________________________________

COURSE
Location ______________________________________________
Tuition cost ____________________________________________
Level: Elementary_____ Intermediate______ Other_____________
Beginning and ending dates_________________________________
Number of lessons _______ Duration of each lesson ____________
Material used: Books__________________________________________________________
Videos________________________________________________________________
Other_________________________________________________________________

STUDENTS
Number finishing course ________ Age range_____________
Previous language skills _________________________________________________________
Is the course shown in the student records? ___________
Was an AATE exam administered? ___________

FORMATION OF CLASS
Name of organizer____________________________________________________________
Publicity method used_________________________________________________________
Supplier of course materials____________________________________________________

COMMENTS OF INSTRUCTOR
Concerning publicity
_________________________________________________________________________
_________________________________________________________________________

Concerning materials
_________________________________________________________________________
_________________________________________________________________________

Concerning teaching
_________________________________________________________________________
_________________________________________________________________________

*Please return this form to:*

Sherry Wells
P.O. Box 1338
Royal Oaks, MI 48068

E-mail: <esperantosherry@tm.net>

# American Association of Teachers of Esperanto

## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME______________________________________ PHONE (___)______________

ADDRESS______________________________________________________________

CITY. STATE________________________________________ ZIP ______________

E-MAIL ADDRESS_________________________________

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

___ My telephone number ___My e-mail address ___Other ______________

NAME & ADDRESS OF SCHOOL __________________________________________

__________________________________________

Are you a professional educator? ___Yes, active ___Yes, retired ____No

Annual dues are $40. Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

If you wish to receive AATE's Bulletin and ILEI's *Internacia Pedagogia Revuo* electronically, instead of via regular mail, the annual dues are $20. Please indicate here: _______

Life Membership $800 _______ with subscriptions by mail $400 _______ with electronic subscriptions

What year is this membership for? 20___ ___New ___Renewal Today's date:__________

I wish to give $________ as a donation to AATE.

Make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" and mail it with this form to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027